



Enhavo

- Sukcesa kunveno kaj agado en Rumanio
- Nov-Jorko komunikas
- Filma konkurso – rapidu!
- La CO de UEA vin invitas!

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-14 sendita el Budapeŝto la 18an de oktobro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 59 kreis konkretajn rekomendojn

Pri la rumana kunveno en Timiŝoara aperas raporto en la novembra *Revuo Esperanto*. Ene de tiu



agrabla renkontiĝo okazis la 59a AMO-seminario, kun la jenaj rekomendoj por la fortigo de landa agado. La plimulto el la rekomendoj estas projektoj, kiujn ili jam en Rumanio realigadas. La elirpunkto por fari rekomendojn estis aŭdi raportojn el diversaj urboj pri plenumita laboro tra la lasta jaro. Unu novaĵo el la kunveno kaj seminario, kiu okazis en la

Okcidenta Universitato de Timiŝoara, estis, ke unuafoje la arta programo estis plene en la manoj de la junularo (vidu la foton).

Rekomendoj el la FLAM-analizo por plibonigo de landa agado:

Pri FLAM-analizo legu <https://eo.wikipedia.org/wiki/FLAM-analizo>

1. Partoprenu en Internaciaj aŭ Eŭropaj Tagoj, Jaroj aŭ Festivaloj.
2. Intensigu la akcepton de eksterlandaj vojaĝantoj aŭ preleg-vojaĝoj.
3. Ekuzu ĉiujn ebloj (interalie la suprajn) por plenumi intervjuojn ĉiuspecajn.
4. Altigu la troveblon kaj vizitadon de E-retejoj kaj kursoj.
5. Realigu pli intensan kontaktadon inter la membroj – ĉu fizike, ĉu rete.
6. Landa Asocio ampleksigu siajn partnerajn rilatojn kun ekstermovadaj instancoj.
7. Stimulu internaciajn kontaktojn kaj projektojn – ekzemple lerneajn.
8. Okazigu pli da kursoj, laŭeble kadre de pli grandaj nemovadaj projektoj.

Plia signifa atingo estas la dum-kunvena reaperigo de ruman-lingva ŝlosilo; la lasta estis eldonita en 1921. Kiel kutime ĝi enhavas koncizajn

gramatikajn klarigojn kun ĝisdatigita vortareto. Rimarkinda aldonaĵo fine estas artikoleto “Kiel mi fariĝis esperantisto”, kun komencaj vortoj: “En februaro 1903...” La aŭtoro estis Heinrich Fischer-Galaŭt, la fondinto de la unua Esperanto-societo en Rumanio en 1904.

Oficejo de UEA en Nov-Jorko ĉe UN komunikas

Informilo 42 – septembro 2019

Uzu tiun ligilon por aliri la version en Esperanto.

- Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo
- Rezolucio de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, Lahtio, Finnlando, 2019
- La unuan fojon Unesko uzos Esperanton en festivalo
- UEA prezentos atelieron en Salt Lake City

“Mia Asocio, Mia Urbo”: Filma Konkurso por Montrealo

Kadre de la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) kaj de la agado por Ĝemelaj Urboj de UEA, ĈRI kun UEA lanĉas la filman konkurson



“Mia Asocio, Mia Urbo”. *Ilustre, la foto montras kunvenon de la bulgara asocio BEA en Sofio en 2014.*

La konkurso celas diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la Eo-asocioj. Por partopreni, kandidatoj devas provizi al la organizantoj mallongan filmon kaj artikolon prezentantaj la Eo-asociacion kaj kelkajn kulturaĵojn de sia urbo ĝis la **30-a de novembro**. La filmoj kaj la artikoloj

devas esti en Esperanto, kaj la plej bonaj ricevos premiojn, kiuj povas inkluzivi repagon de vojaĝo al Montrealo, Kanado, por la 105-a Universala Kongreso, kie la premiotaj filmoj estos prezentitaj.

La 51a Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo NL – valora programo

La stabo de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO invitas vin al la 51-a Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 30-an de novembro 2019, de la 10-a ĝis la 17-a horo en la CO de UEA kaj TEJO en Roterdamo ĉe Nieuwe Binnenweg 176.

La evento estas registrita en [Eventa Servo](#):

<https://eventaservo.org/eventoj/iWnVaxUygORJVwBq>

kaj en [Fejsbuko](#): <https://www.facebook.com/events/2226908600933748/?ti=cj>

La programo:

10:00- 10:30: Akcepto.

10:30- 10:50: Libroservaj novaĵoj; Ionel Oneț.

11:00- 11:45: Prelego; Orlando E. Raola, nova estrarano de UEA, pri "Ĉu ni parolis science?"

Ekskurso tra sep jardekoj de faka kaj populariga scienca verkado en Esperanto".
12:00- 12:45: Prelego; Heidi Goes, pri komenciĝanta Esperanto-movado en Angolo.
12:45- 13:40: Tagmanĝa paŭzo.
13:40- 14:00: Prelego; Klara Ertl, pri pedofilio.
14:00- 14:45: prelego; Guillaume Armide, pri "Ĉu vi volas pravi aŭ feliĉi? SenPerforta Komunikado (SPK)."
15:00- 15:45: Prelego; Duncan Charters, la nova prezidanto de UEA, pri "Interkultura Kompetento kaj miskomprenoj inter diversaj grupoj inkluzive de Esperantistoj".
16:00- 16:30: Prelego; Joop Kiefte, la nova prezidanto de TEJO.
16:30-17:00: Dialoga momento kun la prezidantoj kaj estraranoj de UEA kaj TEJO.



Aldone al specialaj ofertoj, la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la Libroservo. Kafo kaj teo estos senpagaj. En la tago post la Malferma Tago okazos seminario pri la financa stato de UEA.

Orlando E. Raola, estrarano de UEA pri kulturo kaj kongresoj
Said Baluĉi, stabano de TEJO

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolinguloj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.